

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 3/2003
Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Junio 2003

This issue of *Esperanto USA* is brought to you through the selfless support of Ellen Eddy.

Look inside for:

Pasporto	2
Oazo	2
Lokaj grupoj	3
Volontuloj	4
Libroj kaj lumdisko	6
Leteroj	8
Prelego - raporto	9
Korespondantoj	10-11

Lokaj grupoj

Informoj ĉe <http://www.esperanto-usa.org/local.html>

Helpu informi pri Esperanto

reago-subscribe
@yahoogroups.com

Semo Ekĝermas sur Fekunda Grundo: Unuaj Paŝoj al la Kreado de Esperanto-Biblioteko de Usono

de Orlando E. Raola

Bibliotekoj havis kaj daŭre havas ege signifan rolon en la evoluo de Esperanto. Abundas la ekzemploj: Biblioteko Hodler, IEMW-Biblioteko, ktp. Pro tio ke la Internacia Lingvo naskiĝis kiel malgranda libro, havebleco kaj cirkulado de publikigaĵoj rolis kerne en la lingviĝo de la Zamenhofa projekto. Tiom multe, ke laŭ tradicio, esperantistoj festas la naskiĝtagon de LLZ pere de "Tago de la Esperanta Libro".

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) jam delonge kontribuas al disvastigo de Esperanto en nia landego. La libroservo estas unu el la plej gravaj servoj (ĉu eble la plej grava?) disponigitaj de la asocio al la membraro kaj al ĉiuj kiuj interesiĝas pri Esperanto. Tamen okazas, ke la libroservo ne sufiĉas.

Jen kelkaj faktoj. Unue, ne ĉiuj homoj kapablas aĉeti ĉiujn Esperanto-librojn kaj revuojn interesajn por ili. Due, multaj eldonaĵoj ne plu estas haveblaj de nia libroservo kaj foje eĉ ne de iu ajn librovendisto tra la mondo.

Alia problemo estas la sorto de

privataj kolektoj de Esperanto-libroj. Multaj homoj kolektadas eldonaĵojn dum jaroj. Sed okazas, ke foje tiuj homoj kabeĝas, au transloĝiĝas al malpli granda domo, au nature forpasas. Ofte la kolekto tiel zorgeme kunmetita trovas sian vojon al rubujo au en plej favoraj kazoj, al reciklajujo.

Pri ĉiuj ĉi problemoj mi aŭdis jam dum jaroj, sed alvenis la momento agi. Antaŭ proksimume unu jaro, la subskribinto estis taskigita de la prezidanto de ELNA por revivigi la Librarian Komisionon. Mi kontaktis la iamajn aktivulojn (Kent Jones, James Lieberman) kaj ni komencis interparoli rete pri solvoj kaj estontaj agadoj. Dum la 2001 ELNA en Sallaga Urbo, ni daŭre pritraktis la aferon. Inter la partoprenantoj estis du profesiaj bibliotekistoj (Pam Lieber el Novjorko kaj Jay Shorten el Oklahomo) kiuj montris sin pretaj por kunlaboro. Finfine hodiaŭ ni ĝoje anoncas, ke ekzistas la bezonataj kondiĉoj por la kredado de Esperanto-Biblioteko de Usono (EB-

Daŭrigo sur p. 8 - BIBLIO

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468
✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Alexander Shlafer
Vice President/Vicprezidanto: Phil Dorcas
Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: William B Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Joel Amis, Anna
Bennett, D Gary Grady, Anjo Harlow, Lusi
Harmon, Orlando E Raola, Jacob
Schwartz, Tim Westover

*Director, Central Office/Direktoro de la
Centra Oficejo:* Joel Brozovsky

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the
Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 39, No. 3
ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Don Harlow
☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468
✉ donh@donh.best.vwh.net

Materials for esperanto usa should be
sent to/Materialojn por esperanto usa
oni sendu al:

esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

or by e-mail/aŭ retroŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin
are those of the authors, and don't
necessarily represent the point of view
of ELNA or its bulletin/La opinioj esprim-
itaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj,
kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de
ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is
permitted, provided that due credit is
given, and a copy of the reprinted materi-
al is sent to ELNA/Estas permesate
reaperigi materialojn el ĉi bulteno,
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj
ke oni sendu ekzempleron de la repu-
blikigita materialo al ELNA.

Deadline for issue 2003/5/Limdato por
numero 2003/5: 28.09.2003

PASPORTO KRESKAS RAPORTO DE LA KOMISIITO PRI AŬD-VIDA INSTRUADO

de Lusi Harmon

La originala plano estis krei 15
lecionojn, sed ni nun havas 16. La
ekstra leciono iris senpage al tiuj kiuj
jam mendis la tuton – kaj se iu nur
mendis parton, tiu povas mendi nun de
la Centra Oficejo de ELNA – \$325.00 por
la tuto, aŭ po \$85 por ĉiu grupo de 4
lecionoj. KAJ SE MANKAS ALIU SUFIĈE
DA MONO, NEPRE TIU KONTAKTU
RONALD GLOSSOP, Estro de la
Schulze Eduka Fondajo, por peti iom da
financa helpo.

La uzo de la videokurso "Pasporto
al la tuta mondo" fariĝas pli populara
dum pli da personoj uzas ĝin por
instrui. Ni eĉ ricevas plendojn ke
aĉetantoj ankoraŭ ne ricevis la finajn
lecionojn (13-16). Ni jam dissendis
ekzercojn 1-12 al ĉiuj kiuj mendis, sed
se vi ne ricevis, nepre kontaktu min.
Ankoraŭ mankas al ni la finaj versioj
de la ekzercoj por lecionoj 13-15, sed
13 kaj 14 estas preskaŭ pretaj. Stefan
MacGill finos la ekzercojn por la 15a
leciono baldaŭ.

Aldone, Duncan Charters nun

verkas libron klariganta kiel pli bone
uzi la avantaĝojn de ĉi tiu kurso, kaj
Richard Langley redaktas video-
prezentadon pri metodoj uzi Pasporton,
kiun ni filmis dum la kongreso en
Sakramento. Ni certe esperas havi tion
kaj la libron de Duncan pretaj antaŭ la
venonta ELNA kongreso en Boston ĉi
somere.

Diversaj grupoj ekkomencas plani
uzi Pasporton por televida dissendado,
du el ili en Brazilo. En Japanio,
instituto kiu laboras pri metodoj eduki
blindulojn nun tradukas la tekstojn kaj
ekzercojn brajlen – kaj ankaŭ pripensas
la produktadon de sonkasedoj por
blinduloj.

Aliaj bonvolanoj laboras pri
enmetado de la tekstoj kaj ekzercoj en
la interreton por eventuala uzo, kaj tuj
post kiam ni finos la ekzercojn kaj
korektadojn de ili, ni planas eldoni la
tutan serion per DVD. Do nia aŭdaca
projekto kreskas, kaj ni certas ke parte
pere de ĝi, ni povas kreskigi pli kaj pli
da Bonvolanoj.

News from the Oazo

*[The following is taken from a recent issue
of the Newsletter of the Oazo de Esperanto.
Those interested in joining Oazo de
Esperanto, or in other information, should
contact it at 11241 Chapman Ave., Garden
Grove CA 92840.]*

Our meeting hall/clubhouse is
located in a wonderfully serene set-
ting in the high desert. Located
near the Mojave River, it sits amidst
the desert flora and fauna and ex-
pansive views of majestic scope.

Recently the heavy equipment
contractor completed the rough
landscaping, leaving little to distract
a visitor from the quiet charms of
the setting. RV parking can now be
accommodated and we look forward
to regular visits by our members
and friends.

Many steps in the construction
process were arduous, but the sat-
isfaction of finally completing our
first building overcomes all fatigue.

We have electricity, gas and water
on-site. The next steps include a
nature walk, and a possible desert
tortoise habitat. Also planned are
fire-pit areas for telling dramatic
stories in Esperanto. We think chil-
dren will most enjoy these additions.

Great thanks go to our founding
member, J. Tilman Williams. He
remains the greatest supporter and
benefactor of this effort. Not only did
he donate the land, but he contrib-
uted his time, effort and a good deal
of his money to every step of the pro-
cess.

The meeting hall is equipped
with shower and rest facilities. The
kitchen includes stove, microwave
oven, running water, tables and
chairs. A round table in the main
area seems perfect for future les-
sons and laughter.

Outside, one readily notices the
water well and the caretaker's
home.

Eblas vs Povas

de Don Harlow

Not too uncommonly, I read in messages from relatively new Esperanto speakers (and, less commonly, from experienced speakers) a sentence such as the following:

Mi eblas fari tion.

Is this wrong? Yes. The correct sentence would be

Mi povas fari tion.

What's the difference?

Povas is a word that shows that the subject with which it is associated *can do something*. **Eblas** is a word that shows that the subject with which it is associated *can happen*.

As you can see, for something

to happen, it has to be an action of some kind. This severely limits the kind of word that can be used as a subject. In particular, of the personal pronouns *only ĝi and ili can be associated as subjects with eblas*. This is because the other personal pronouns (*mi, vi, etc.*) can apply only to living things and so not to words that name actions.

Kion povu fari loka grupo?

de D. Gary Grady

[La jena artikolo aperis kiel mesaĝo en la retlisto de ESTri en Norda Karolino.]

Edward Haag levis efektive du gravajn kaj diskutindajn demandojn:

- Kiel usona e-isto ne povanta multe vojaĝi eksterlande povas utiligi por si Esperanton?
- Kion povas fari lokaj (kaj supozeble regionaj kaj landaj) organizaĵoj por helpi?

La respondoj ĝis nun traktas plejparte nur la unuan demandon. Ni ja povas korespondi, legi literaturon, aŭskulti radion, ktp. Pro la ekzisto de Internet, ĉi tiuj aferoj estas eĉ pli facile fareblaj nun ol en la pasinteco. (Bona startloko estas <http://www.esperanto.net>, kie troviĝas ligoj al multaj utilaj retpaĝaroj en kaj pri Esperanto.)

Sed kion povas fari klubo kiel grupo?

Kompreneble, la ĉefa afero estas permesi al membroj ekzerci sin pri la parolata lingvo – io malfacila por unuopaj Esperantistoj. Bona regulo estas paroli pri io ajn en Esperanto kaj pri Esperanto en iu ajn lingvo (kiun regas la partoprenantoj, kompreneble).

Por komencantoj ofta problemo estas nesufiĉa vortprovizo paroli nur esperante, sed oni povas simple interjeti laŭ neceso kelkajn anglajn vortojn (kaj prefereble samtempe skribi ilin por posta ĉasado en vortaro).

Estus utile, se ĉiu membro alportus al la kunveno ion por diskuti, ekzemple artikolon, leteron, ktp, ĉu verkita de la membro ĉu nur legita de tiu. (Se temas pri sufiĉe granda grupo, la tasko povus esti dividita laŭvice.) Sciencstudentoj ofte membras en “jurnalklubo” en kiu ĉiu membro resumas la enhavon de kelkaj lastatempaj sciencaj jurnalaj. E-istoj povas fari ion similan.

Grupo povas havi ankaŭ komunan projekton. La grupo en Vaŝingtono foje faris tre neformalan sed interesan vidbendon por prezenti sian urbon. (Ili fakte ne emfazis la turismajn partojn sed la ordinarajn, ĉiutagajn.) Preskaŭ ĉiu nun havas (aŭ povas prunti) amatoran vidkameran, do ĉiu grupo povus fari ion similan kaj interŝanĝi la vidbendon kun aliaj Esperanto-grupoj en- kaj eksterlande.

(Por alilandanoj, la plej ordinaraj aferoj povas esti tre interesaj. Ekzemple, estas surprize grandaj diferencoj inter Usono kaj Britio kiam temas pri restoracioj kaj manĝajvendejoj. En Britio, restoracio ofte postulas pli da mono kiam oni tie manĝas, ol kiam oni forportas la manĝon. Kaj en manĝajvendejoj, oni aŭ alportas sian propran sakon aŭ aĉetas plastikan sakon de la vendejo.)

Tia projekto estus por la grupo io amuza por fari kaj bona kialo kunveni. Spekti ĝin estus ankaŭ

por aliaj grupoj bona kialo por kunveni kaj io por posta diskuto. Se oni ne povas mem vojaĝi, almenaŭ ties bildo kaj voĉo povas viziti aliajn landojn!

Kaj ne timu, ke la usona televidsistemo (NTSC) ne kongruas kun tio en aliaj mondopartoj. Fakte, la saman sistemon uzas multaj aliaj landoj kiaj Japanio, kaj modernaj vidbendaparatoj kaj televidiloj por PAL kaj SECAM — la du aliaj televidsistemoj — nun preskaŭ ĉiuj povas montri NTSC-ajn vidbendojn. (La alidirekto, bedaŭrinde, ne estas vera.)

Alia ideo pri projekto, kiun fakte jam preparolis Enrique kaj Edward: Grupo de grupoj — eble kunlaborante per helpo de regiona aŭ de landa asocio, aŭ simple per rekta kontakto inter la grupoj — povus inviti iun alilandan Esperantiston ĝui malmultekostan aŭ eĉ senpagan viziton al Usono. Membroj de ĉiu grupo gastigus la vizitanton dum po kelkaj tagoj, kaj la tuta membraro kontribuos po nemulte al la kosto veturigi la vizitanton diversloken. La vizitanto laŭvice vizitus ĉiun grupon kaj eble gvidus konversacian aŭ Cseh-metodan kurson. La vizito povus komenci aŭ fine per la landa kongreso kaj/aŭ NOREK.

(Mi konfesu, ke mi persone neniam vere realigis eĉ unu el la ĉi-supraj ideoj, sed ĵus komencis nova jaro, do eble en la baldaŭa estonteco...)

Volontuloj vivigas la Esperanto-movadon

Baldaŭ okazos la plej granda ŝanĝo en la Centra Oficejo en jardeko: duonigo de la stabo. Pro manko de sufiĉa enspezo uzebla por la funkciado de ELNA (ne limigita al speciala programo), necesas maldungi la vicdirektoron de la Centra Oficejo, s-ron Don Harlow. Lia dungiteco finiĝos je la fino de julio, 2003. Mi multe dankas lin pro lia granda sindediĉo al ELNA kaj la Esperanto-movado, dum multaj jaroj, sed precipe dum la lasta jaro kaj duono kiam li laboris en la oficejo kiel vicdirektoro.

Ekde aŭgusto, en la oficejo laboros nur unu dungito, la direktoro: tio estas mi. En oficejo kie du homoj ne sukcesis plenumi ĉiujn taskojn donitajn, malgraŭ kelkfoje longaj tagoj kaj de tempo al tempo semajnfina laboro, neniu atendas ke nur unu homo povos fari ĉiom kiom faris du antaŭe. La defio estas, kiel plej efike fari la plej gravajn taskojn, kiel elekti malpli gravajn por lasi ne faritaj, kaj kiel delegi laŭeble multajn taskojn al volontuloj. Tiujn demandojn ni klopodos respondadi dum la venontaj monatoj.

Estas certe, ke la afero iros pli glate se ne mankos volontuloj pretaj helpi regule, kaj aliaj pretaj helpi de tempo al tempo. Jam kelkaj volontuloj helpas en la oficejo, kaj aliaj helpas nian laboron sen korpe iri al la oficejo. Mi volas ĉi tie danki kelkajn el tiuj, kaj mi pardonpetas se mi ial preteratentas iujn. Nu, ELNA havas multajn volontulojn: ĉiu estrarano, ĉiu komisiito kaj komitatano estas volontulo, kaj tre dankinda. Sed ĉi tie mi mencias nur kelkajn kiuj specife helpas la oficejan laboron, sen

komisio aŭ komitato.

Kiam ni dissendas poŝtaĵojn amase al la membraro aŭ al informpetintoj, ni petas helpon enkovertigi kaj prepari la sendaĵojn. Kutime venas unu ĝis kvar volontuloj por helpi. Regulaj helpantoj en tiaj okazoj inkluzivas la jenajn lokajn esperantistojn: Bob Likuski, Bill Harmon, Anjo Harlow, kaj Leonora Brozovsky.

Alia grava ŝanĝo necesa por plifaciligi la oficejan laboron por nur unu oficisto estas ioma modernigo de la komputilaj sistemo kaj programaro, kaj interreta aliro. Tio akoraŭ okazas, kaj verŝajne necesos kelkaj monatoj por fini la nun planitajn ŝanĝojn. Por tio multe helpas profesiuloj Ed Williger kaj Vivian Burns. Vivian kreas por ni novan datumbazon en moderna programo uzebla kaj en Vindozo kaj en Makintoŝo, tiel ke ni povu emeritigi la antaŭan datumbazon funkcieblan nur en MS DOS. Samtempe ni emeritigos la antikvan komputilon en kiu ĝi funkciis, kiaj ĝin anstataŭigos per iom malpli malnova maŝino donacita de *Esperanto-VojaĝServo*. Kiam la ŝanĝo estos finita, mi antaŭvidas plurajn avantaĝojn, kaj pli efikan funkciadon ol eblus per la malnova sistemo.

Lige kun tio estas ŝanĝo de retaliro. Ni ankoraŭ uzas nur telefonan aliron al la reto, tre malrapidan. Nian interretan servadon (ISP) aĉetis alia firmao antaŭ kelkaj monatoj, kaj tiu tuj altigis la prezojn kaj malaltigis la servon. Ni do planas ĉesi uzi tiun servon. Nun nia volontula ttt-estro Jay Fishman (vidu lian raporton poste) transmetas niajn ttt-paĝojn de tie al la servilo de ELNA-membro Richard Jernigan, kiu donacas al ELNA multan spacon sur sia servilo. Kiam Jay finos transmeti ankaŭ la retpoŝton kaj la regnomon, ni planas

forlasi la nunan servon kaj ekuzi pli bonan aliron al la reto, kiu espereble kostos ne tiom multe ĉar ni ne bezonos spacon sur servilo, nur la aliron. Nia retbutiko, kiu situas ĉe la sekura butikejo *Hypermart*, restos tie almenaŭ por nun.

La interreto iom post iom iĝas pli grava en nia laboro, kaj en nia movado. Ŝajnas ke la plimulto el la novuloj al Esperanto venas pere de la reto, kaj multaj el ili ankaŭ eklernas rete. La Esperantejoj en la reto multobligas rapide, kaj en kvanto kaj en kvalito. Simile multobligas la esperantlingvaj diskutgrupoj. Eblas rete diskuti preskaŭ ĉiun temon per Esperanto nun, sed se mankas diskutgrupo pri via amata temo, simple fondu la propran; tio nun estas facila.

Nia libroservo nun havas rekorde grandan elekton de libroj, KD-oj, kaj sonbendoj en sia katalogo, danke al la laboro de Don Harlow. Esperanta eldonado floras ĉirkaŭ la mondo, kaj malgraŭ tio ke ni aldonas dekojn da novaj titoloj ĉiumonate, tio estas nur malgranda parto de tiuj eldonataj. Kune kun la plimultigo de titoloj venas pli multaj mendoj. Ne surprize — estas tiom da interesaj libroj haveblaj nun! Bonvolu serĉi viajn ŝatatajn legaĵojn en nia katalogo papera aŭ enreta, kaj subtenu tiun ĉi gravan agadon por Esperanto.

Alia servo de ELNA estas la sonbenda servo — aro da sonbendoj de radielsendoj, prelegoj, salutoj, legadoj, diskutoj, intervjuoj, kaj aliaj registraĵoj en Esperanto. Ni kopias ilin laŭ mendo por sendi al mendintoj. Antaŭe ni sendis nudan kasedon sen klara etikedo indikante la enhavon (nur mane skribita kodnumero), sed mi komencis uzi laseran surpaperigilon por krei etikedojn por la kasedoj kiuj

almenaŭ helpos la uzantojn scii kio estas en la bendoj.

Tamen, nuntempe pli kaj pli oni ne plu uzas kasedojn, sed preferas KD-ojn. Indas konverti tiujn kasedojn al cifereca signalo kaj meti sur KD-ojn. Tio tamen estas temporaba tasko (por tiom da kasedoj — kelkcent), por kio mankas al mi tempo. Feliĉe, inter ELNA-anoj estas volontuloj kiuj jam komencis fari tion. Unue komencis s-ro Timothy Wand en Missouri. Li iom "purigis" kaj ciferecigis nian kasedon el Svisa Radio Internacia kun la voĉo de L.L. Zamenhof mem, registrita en 1909 ĉe la 5-a UK en Barcelona sur vaksa cilindro. Tiu kasedo montriĝis populara premio por membroj de la Gvidrondo en 2003 (pli altnivelaj membriĝoj en ELNA, kiuj finance subtenas nian agadon).

Pro personaj kialoj, s-ro Wand devis paŭzi en tiu laboro, sed cirkonstancoj denove permesas al li fari, kaj ankaŭ aliaj samrondanoj pretas helpi. Intertempe aperis alia volontulo, Timothy Howe en Oregono, kiu ciferecigas sonbendojn kaj kreas el ili KD-ojn. Pro la granda nombro da sonbendoj, tiu tasko daŭros ankoraŭ plurajn monatojn aŭ eĉ jarojn, sed danke al tiaj diligentaj volontuloj, ĝi okazas, kaj iom post iom la enhavoj de la sonbendoj haveblos ankaŭ sur KD-oj, kaj elektitaj partoj en la reto.

Alia entuziasma volontulo lasttempa estas s-ino Diana Weichert, kiu kreas ttt-paĝojn por pluraj Esperanto-organizoj, kaj havas multajn ideojn ankaŭ por nia ttt-ejo. Granda avantaĝo de reta volontulado estas tio, ke ne gravas kie oni situas, oni povas same bone fari tian laboron. Do, ne hezitu proponi vin kiel volontulon por helpi nian agadon. Esperanto vivas dum pli ol jarcento ĝis nun ĉefe per volontula agado, kaj nun ni en Usono devas montri ke volontulismo ankoraŭ bone vivas.

Financial Aid to ELNA

The General Electric Foundation has what it calls its Corporate to a college where they, or their spouses or children, are or have been students of courses for college credit toward a degree. Through the years I have made many donations to my alma mater and those of my wife and kids. Many of these donations were specifically in support of programs on Esperanto at some of those colleges, specifically, Berkshire Community College, Massachusetts State College (now Massachusetts College of Liberal Arts), School for International Training, and University of Hartford.

The General Electric Foundation also matches donations made by its employees or retirees to other (shall I call them) 'do-good organizations' i.e. non-profit. To qualify for matching funds, a group of at least ten (10) G.E. employees or retirees must make donations of at least \$15 each, which in total will be at least \$1000. Each donation must be from the donator's personal funds, that is, not from any money provided to

him / her for the purpose of making this donation. This qualification will be sustained for as long as the total of donations for each year is at least \$1000.

The Esperanto League for North America is in financial trouble at this time. It has spent a large sum in producing the Esperanto course, **Pasporto al la Tuta Mondo**, a truly great program for TV, on video tape, soon to be on DVD.

We can qualify the Esperanto League for North America for this matching funds program. There must be at least ten G.E. employees or retirees among us members of ELNA, or others who support the great works of ELNA, and who would donate at least \$15. If you are one, then please send me your name and tell me the amount that you would donate.

Allan C. Boschen
585 Shaw Road
Windsor, MA 01270

<acboschen@aol.com>

New Members

Ilan Arielli (Washington, DC)
Ray Aune (Bloomington, MN)
Ron Boerem (Ontario, CA)
Anita Bustamante (Lakewood, CO)
S Randall Converse (Madison, WI)
John C Feldman (Bartelso, IL)
Pamela Felton (Johnstown, PA)
Marjorie Gelin (Monterey, CA)
Dan Guarro (Bradenton, FL)
Brian Hardwick (Simpsonville, SC)
Matt Kaufman (Fairport, NY)
Simon Mendoza (Clifton, NJ)

Fritz Neumann (Alhambra, CA)
Elana K Nunez (Wilmington, NC)
Donnis Ronquillo (Los Angeles, CA)
M H Saheb-Zamani (Tehran, IRAN)
Brett C Sanders (Kingman, AZ)
Herb Sennhenn (Edgerton, WI)
Theodore Spahn (Chicago, IL)
Henri Spehar (Atlanta, GA)
Jonathan Spore (Rolla, MO)
Diana Weichert (Coraopolis, PA)
Russ Williams (Austin, TX)

Duakanonaj Libroj, La. Tr. Berveling, Gerritt. Vol 1: La historiaj libroj. 2001. 263p. 210x130. Broŝurita. Brazilo. Ĉe ELNA: Kodo DUA002, prezo \$19.70. Vol. 2: La poeziaj kaj profetaj libroj. Chapecó: Fonto, 2001. 2001. 261p. 210x140. Broŝurita. Brazilo. Ĉe ELNA: KodoDUA003, prezo \$18.70.

Kion kaj kiom ampleksas la Biblio? Oni de tempo al tempo vidas Biblion kun noto, ke ĝi inkluzivas la Apokrifon: tiuj libroj de la Malnova Testamento, kiujn ne ĉiuj kristanoj akceptas kiel kanonajn. Mi persone memoras du fojojn en la lastaj jardekoj, kiam iu aŭ alia serĉadis Apokrifon en Esperanto, kiel aldonon aŭ suplementon al la Londona Biblio.

Pli ĝuste, laŭ la tradukinto Gerrit Berveling, oni nomu tiujn librojn Duakanonaj. (*) Ĉar la termino Apokrifo entenas signifon, ke ĝi estas "sekreta." Kaj li kolektis, tradukis, kaj prezentas al ni en du volumoj la plej gravajn.

En la unua volumo, li komencas per enkondukaj artikoloj, kiuj travojaĝas evoluon de la Biblio kiel kolekto. Poste venas la libroj mem, kun klarigoj pri la fontoj: Tobit, Judit, Aldonoj al Ester, 1a kaj 2a Makabeoj.

En la dua volumo: Saĝeco de Salomono, Saĝeco de Jesuo Sirah, Baruh, Letero de Jeremia, Aldonoj al Daniel.

Eble iuj ĝis iu grado konas la rakontojn en la unua volumo, eĉ se tiuj ne trovis ilin en sia propra Biblio. Ekzemple, la vera historio pri la Makabeoj, kies tre sangoplenan bataladon oni prezentas ĉi tie. Kaj en Makabeoj oni trovas teologian pravigon pri preĝado por la mortintoj, kio evoluigis la ideon pri Purgatorio.

Kontraste al la ofte vigla rakontado en la libroj de la unua volumo, estas la pli densaj sentencoj, aforismoj kaj similaj eldiroj en la dua. La plej longa, Sirah, povas stari en si mem kiel kurseto pri evoluo de morala kaj teologia

pensado en tiu epoko.

Tiujn aldonajn librojn de la Malnova Testamento la kristana eklezio trovis akcepteblaj en la fruaj jarcentoj. Sed ili ne troviĝis en la hebrea kanono (TeNah). Kiam venis la protestanta reformado, precipe Johano Kalvino forigis tiujn librojn el la kanono ĉar ili ne estis en la hebrea. Marteno Lutero mem singarde akceptis, kaj iuj protestantaj eklezioj ĝis nun enmetadas ilin kiel apartaĵojn, ofte lokigitajn inter la Malnova kaj Nova Testamentoj. Kontraste, la romkatolikoj en la reforma tempo reasertis, ke ili ja estas kanonaj.

Multajn detalojn Berveling prezentas al ni rilate ĉi tiun fascinan historion pri la evoluo de la kristana Biblio. En reklamo dorskovrile kaj en aliaj eldonaĵoj, oni diras ke "Legindas ja *tuta* Biblia tekstaro, ne nur ĝiaj centraj verkoj." Estas planita almenaŭ unu volumo pli, kun verkoj ne eldonataj en la ordinara "Apokrifo."

Plue, jam haveblas en Esperanto ankaŭ la Evangelio de Tomaso. Kaj anglaparolantoj de tempo al tempo renkontas represon de tiu "Lost Books of the Bible" (Perditaj libroj de la Biblio), kiu unuafoje aperis en la frua 20a jarcento. Kaj antaŭ ĉirkaŭ 50 jaroj, oni diskonigis al la mondo la Rulaĵojn de la Sala Maro.

Eĉ se vi ne volas akcepti ĉi librojn kiel kanonajn, eble vi trovos ilin almenaŭ parte inspiraj, kiel ekzemple rolas verkoj aŭ eldiroj de Lutero, Billy Graham aŭ aliaj predikantoj.

R. Jaderstrom

(*) *Efektive, en la angla la ĝusta termino estas "Deuterocanonical". (N.d.l.R.)*

Diversaj: Por aktiva lingvopolitiko. 1999. 71p. 210x145. Paper. Nederlando. ISBN 929107062X. Ĉe ELNA: Kodo POR005, prezo \$9.10

Ekde la kovrilo (kun bildo de manskribita letero de L. Zamenhof) tiu maldika libro (71 paĝoj) kaptis kaj tenis mian atenton. Ĝi estas kolekto de tekstoj, kiujn oni prezentis kaj diskutis dum la lingvopolitika seminario en la 81-a UK en Prago (1996). Ne ĉiuj testoj de la seminario troviĝas en la libro, sed tiuj kiuj ja troviĝas estas pensigaj. Kiam mi petis la libron,

mi supozis ke mi jam scias kio estas lingvopolitiko kaj lingvoplanado, sed en la unua artikolo – "Kio Estas Lingvoplanado", de Humphrey Tonkin – mi devis iom enfokusigi miajn pensojn pri ambaŭ terminoj.

Unu el la plej longaj tekstoj (Yamasaki Seikoo – "Lingvoplanado en Japanio") estas eble la plej rimarkebla pro la kontrasto de la aliaj. Iom pezas la legado pro nekutima skribstilo kaj multaj novaj terminoj por priskribi detalojn de la japana lingvo, sed indas la peno, ĉar ĝi estas vido en aferon, kiun oni alie ne vidus.

Vere estas interesa tiu mallonga libro. Efektive, la plej granda manko estas la manko de kelkaj artikoloj, kiujn oni prezentis sed ne inkluzivis en la libro. De la listo de prezentaĵoj mokas nin kelkaj interesaj titoloj, kiujn oni diskutis sed ne enmetis en la libron.

Thomas Alexander

Persone: Sen. CD. 40'45" daŭro. 2002. Francio. Ĉe ELNA: Kodo SEN007, prezo \$16.90.

Persone estas unu el la plej daŭraj rok-muzikistaroj en Esperantujo. Ĉifoje, la elektrajn muzikilojn ili lasis hejme, kaj produktis la K-Diskon "Sen" per akustikaj instrumentoj. La kantoj havas simplan, rektan sonon de voĉoj kaj gitaroj, kiu plaĉas al mi. Aldoniĝas en pli fona rolo fluto, mandolino, kontrabaso kaj diversaj ritmiloj. La kunmeto estas efika kaj taŭga por la celita stilo.

La senornamaj harmonioj trafas sone kaj kone, permesante al la aŭskultanto facile kompreni la kantitajn vortojn. Kaj en tiuj vortoj, oni trovas poezion, defion kaj interesajn ideojn. La kantoj traktas oftajn temojn de amo, perdo kaj soleco, sed per malofta kaj originala vidpunkto. Ĉiuj el la kantoj portis surprizojn al mi. Neatendita intrigo, metaforo kaj mensbildo kaptis mian atenton, kaj tenis ĝin dum multfoja aŭdo. La verkantoj donas la impreson de profunda sperto pri la vivo. Ili konas la esperojn kaj trompojn de interhomaj rilatoj, kaj evitas naivan trokredon en ambaŭ. En sia rigardo al la vivo, la kantoj montras komprenan, homaman akcepton. La efiko estas foje

melankolia, foje pli pozitiva, ĉiam pens- kaj sentinstiga.

La unua kanto rakontas pri Petro, kiu pro rompita koro, fuĝas al eksterlando por periodo de diboĉado kaj forgeso. "Sekvis li la regulojn, kaj faligis sin, kvazaŭ laŭ destin', en malhelajn okulojn." Nenio nova ĝis tio, sed sekvas la surprizo. Anstataŭ daŭrigi tiun historieton, la kantistoj subite demandas rekte al ni, la aŭskultantoj, ĉu "nun venu moralajo?" La verkinto agnoskas ke kritikoj eblas, sed li preferas kompaton, finante per konkludo, kiu estas ankaŭ la titolo, ke tiu ĝojosurogato "Estas pli ol nenio." Alia supero de kliŝaj ŝablonoj troviĝas en la unua strofo de la tria kanto: "Mi ĉiam kredis ke la koro, Rakontas pri la ver', Kaj ke mi devus sekvi ĝin. Sed ĝi rakontis pri amoro, kaj dolĉa amafer', kaj plu mensogis pri destin'." Pripensinda kontrasto, ĉu ne?

La vortuzo, rimo kaj ritmo donas plezuron al atentulo. La longeco de strofoj montras plaĉan varion en diversaj kantoj, kun du, tri, kvar, kvin, ses aŭ ok linioj. Internaj rimoj abundas, kune kun subtilaj malkovroj. Ekzemple, en la skribita teksto de "Korpo kaj anim'," la rimo de "semajnoj" kun "trajno" ŝajnas iom lama. Sed en la kantita versio, "trajno" prenas sian pluralon de la sekva, ritme kuna vorto. Aŭskultante, vi notas ke la rimo de la plena frazo estas perfekta kaj interesa: "Tagoj kaj semajnoj, pasas kiel trajno, jaroj kaj monatoj jam ariĝis." Simile plaĉis al mi la ritma rimigo de "voĉoj raŭkaj" kun "adiaŭ' kaj." En "Lasu min sonĝi" kaj "Perloj sur la ter'," la longeco de la vortaj kaj muzikaj frazoj varias inter si. Tio donas tre interesan cikladon de emfazo kaj harmonio.

"Sen" enhavas dek unu kantojn, kiuj sumas al iom pli ol kvardek minutoj. Bertilo Wennergren verkis kvar el ili, kaj Martin Wiese verkis sep. Anders Grop aldonis sian voĉon al tiuj de la verkintoj, kaj ĉiuj tri ludis muzikilojn. Mia sola deziro: ke iuj kantoj estu pli longaj. La interesaj ideoj meritas pliajn strofojn, foje. Por tiuj, kiuj ŝatas muzikon kun plaĉa harmonio kaj bona poezio, *Sen* estas plurnivele pripensinda verko.

Derek Roff

Anoncoj

En 2004, la Esperanto-Centro de Angers (Francio) festos la centan datrevenon de la kreado de Esperanta grupo en la urbo.

Je tiu okazo, oni antaŭvidas diversajn manifestaciojn kaj interalie internacian ekspozicion de infanaj desegnaĵoj, sub oficiala patronado, pri la ĝenerala temo de la "daŭra disvolviĝo" (protektado de la naturo, arbaroj, bestoj, lukto kontraŭ la poluado, lernejoj por ĉiuj infanoj, suna energio, pli sana agrikulturo, agado por havigo de pura akvo, protektado de la sano, ktp).

La plej belaj desegnoj estos premiitaj, kaj por la lernejoj kolektivaj sendoj oni povos antaŭvidi interŝanĝon de desegnaĵoj kun francaj lernantoj.

Estos tri kategorioj por la partoprenantoj:

ĝis 7-jaraĝa;

de 7- ĝis 10-jaraĝa;

de 10- ĝis 14-jaraĝa.

La desegnaĵoj estas sendotaj al:
Esperanto-centro
s-ron Frangeul

6, rue du Buis, 49000 Angers,
Francio

Internet-kuriero: <bertrand-
gilet@wanadoo.fr>

—

Posters in the ELNA poster series are now available on-line (in PDF format) at: <http://www.esperanto-usa.org/posters>. Feel free to download them as needed.

—

Mi multe volas aĉeti ekzempleron de la libro "Bild-Libro Pri Bestoj", presita en Britujo en 1961. Mi pretas pagi \$25 por ĝi. Se vi havas kaj volas vendi ekzempleron, bonvolu kontakti min. Arlyn Kerr, (425) 396-7875, <arlynkerr@earthlink.net>.

Internacia Fotokonkurso

Post kvin sukcesaj konkursoj (1998, 1999, 2000, 2001, 2002) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la sesa Internacia Fotokonkurso.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10x15 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando). La fotoj devas atingi la sekretarion antaŭ la 15a de decembro 2003.

La konkursaj fotoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

Tripersona juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1a premio: 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2004.

2a premio: 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2004.

3a premio: abono de *La Ondo de Esperanto* 2004.

Specialan premion (libroj de Sezonoj kontraŭ ekvivalento de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premio ricevos diplomon.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2005 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Sukcesojn!

Letter to the Editor: It was evident, regretfully, that many of those attending the March Chapter meeting did not understand or assimilate much of the very informative comments by the speaker, **Luc Veysierre. June Fritz** of Wilber, a member of the Nebraska Division, UNA-USA, and a regular attendee of chapter meetings, notes that "as an Esperantist, she was able to grasp about 60-80 percent and was able to fill in the gaps." In the following letter, she makes the case for more individuals to learn Esperanto:

Dear Editor:

My son, **Ted Browne**, and I have been users of the international language, Esperanto, for more than 20 years. We find it not only a great means by which we can connect up with people from all over the world, but also a help in understanding the English spoken by foreign-born people. We own a very small apartment house in Crete, and rent to Asians and Hispanic people, even an occasional Moslem. Being Esperantists has helped us understand the broken English of many, many people. This is not because of the international vocabulary of Esperanto as much as it is because our ears have been trained to pick up the different ways that people accent words and pronounce vowel sounds.

When a group of Esperantist-students of the language and old-timers-get together, communication is much smoother than when native English speakers try to communicate with foreigners who have spent six or more years trying to learn English. Granted, there are those who manage to become fluent in English, but the greater number do not. Ours is a terrible language for East Europeans, Africans, Arabians and Asians to learn. Even our neighbors to the south have a dreadful time trying to pronounce English so that Americans can understand them.

As English contains some of the West European language roots, people from there do better with learning it than the others. Learning to read a foreign language is an entirely different skill than being able to think and talk in the language. Being able to write in the language is also easier than carrying on a conversation. It is extremely hard for people to break

away from their native accents and speech habits.

I would guess that to go to grad school in the U.S., Luc Veysierre has studied English for several years. Yet I would guess that Luc's talk was hardly understood by most of his audience.

Yes, this is a plug for Esperanto! One can learn to use Esperanto in only a few short weeks. In six months, one would become fluent. After that, any Esperantist from any country in the world would be able to understand the new Esperantist quite well. Large gatherings of Esperantists do not need any simultaneous translators!

A new phenomenon is the popularity that Esperanto is gaining on the World Wide Web. Web sites abound with lessons, daily news, music groups, radio stations and downloadable books and magazines. Readers of this newsletter may go to esperantonebraska.org for an example of how this amazing international cyber world gets linked together.

/signed/ June Fritz

As you know, our local newspaper, *The Valley Morning Star*, gave some good publicity to Esperanto which included a photo and story about my classes in Harlingen. This story was put on the internet and was really great!

But what I'm writing you about is that a couple of days afterward there was a very informative letter from Gary Grady (from North Carolina, yet) in the "Letters to the Editor" column commenting favorably on the story and giving some additional info about Esperanto. Then, today - over a week later - there was a letter from Scott Redd (Nebraska) adding more insights!

If other newspapers are like ours, they welcome "letters to the editor". The point of this message to you is that Esperanto can get even more publicity if we enthusiasts send responses to stories we see in the paper. As everyone knows, the stories, themselves, don't have to be about Esperanto, but what "help" knowing or using Esperanto could be! (Kent Jones in Chicago knows all about this!)

Prenda Cook

BIBLIO - Daŭrigo de p. 1

USONO).

La ĉefrolulino en la projekto estas esperantistino Angelina Taremi, el Scottsdale, Arizono. Ŝi disponigas al la asocio spacon por komenci arigi nian librokolekton. Ŝi logas en granda domo kaj tie ŝi havas ĉambron por biblioteko. Jam delonge ŝi invitas geesperantistojn viziti la Verdandomon de A, kie de nun ekfunkcios EB-USONO. (Vidu pliajn informojn ĉe <http://verdandomo.tripod.com/>).

La Biblioteka Komisiono pretigos katalogon de haveblaj publikigaĵoj kaj tuj la katalogo estos rete alirebla. Kiam la interesitoj bezonos ion ajn el la biblioteka kolekto, ili povos ricevi la materialon per poŝto kontraŭ pago de sendokostoj (inkluzive pakadon kaj enpoŝtigon). En venontaj numeroj de *Esperanto USA* ni raportos pri la evoluo de tiu ĉi projekto kaj diskonigos detalan regularon, kiu celos la konservadon kaj ĉiaman pliriĉigon de nia nova kultura trezorejo.

Do, ek! al la agado. Ekpaku tiujn librojn kiujn vi ne bezonas, aŭ kiujn vi jam legis kaj ne volas konservi, aŭ tiun riĉan kolekton kiun vi ricevis de via forpasinta praonklino kaj sendu ilin kiel eble plej baldaŭ al:

Angelina Taremi, P. O. Box 9342, Scottsdale AZ 85252-9342.

Se vi uzas servon kiu postulas stratadreson, ĝi estas:

Angelina Taremi, 2401 W. Southern #246, Tempe AZ 85282.

Vi ricevos agnoskon de ricevado kaj dankon pro via kunlaboro. Ne hezitu kontakti la komisionon pri biblioteko, jen rekte jen pere de la centra oficejo de ELNA, se vi havas sugestojn aŭ ĝeneralajn demandojn pri tiu ĉi nova/malnova agadkampo.

Certe ni sukcesos je tiu ĉi nova tasko. Bonvenon al nia biblioteko!

Orlando E. Raola
Komisiito pri Biblioteko
Estrarano de ELNA.

Prelego en Uniontown Area High School (PA)

De Diana Weichert

Dankon pro la bondeziroj por la prelego, mi vere bezonis ilin ĉar pro la malsaneto de mia filino hieraŭ, mi ne volis hasti hodiaŭ matene kaj mi preskaŭ nuligis la prelegon. Sed ĉar tiu dato de hodiaŭ jam estis la lasta ebleco, mi tamen veturis tien. En la klaso ili jam lernis en Esperanto jenon: la kolorojn, la tagojn de la semajno kaj la monatojn, diris al mi sinjorino Heidi Miller, la instruistino de la kurso “Exploring languages”. Ili ankaŭ lernis iom pri la historio de Esperanto, almenaŭ la nomon de Zamenhof.

Do kion mi aldonis en mia prelegeto estis: Kial kaj kiel mi eklernis Esperanton, nome ke mi jam scipovis 5 lingvojn kaj ke iam aŭdis pri E-o kaj pensis ke MI ne bezonas ĝin, mi ja konas tiom da lingvoj kaj planis ankaŭ lerni la hispanan kio entute do fariĝos 6 lingvoj. Kaj ke en unu tago jarojn poste mi renkontis 2 diversajn homojn kiuj parolis nek la germanan, nek la anglan, hispanan, francan, rumanan aŭ la japanan, kaj mi pro kolero ke mi ne plu volas lerni la araban kaj la rusan (tiuj estis la lingvoj + ilia loka lingvo parolataj de la du homoj) mendis libron pri Esperanto, *Mia amata Esperanto* de Rikardo Schulz.

Mi ankaŭ rakontis pri la fakto, en Usono tute nekonata, ke la Germana ne estas la sola lingvo parolata en Germanio, sed ke oni iam ajn decidis ke la Germana parolata en Hannover, estu tielnomata *Hochdeutsch* (alta-germana lingvo) kaj ke ĝi estas la sola interkomprenebleco inter la tute malsimilaj lingvoj nomataj “Germana” en Bavario (suda

Germanio) kaj la “Germana” en la nordo de Germanio. Apud la landlimo kun Nederlando, la “Germana” loka dialekto havas memkompreneble nederlandan akĉenton kaj enhavas multajn nederlandajn vortojn.

Pri la historio de Esperanto mi aldonis ke kvankam Esperanto estas planita lingvo, ĝi estas viva kaj evoluanta lingvo. Antaŭ 100 jaroj oni ne havis komputilojn kaj precipe tiuj vortoj estas nuntempe aldonitaj, kiel *ttt* kaj *faksilo* ktp. Zamenhof kreis la *internacian lingvon*, la vera nomo de Esperanto, kiam li estis 17 jara kaj lia patro forbruligis la tutan projekton ĉar tiam estis malpermesite kaj danĝere elpensi “sekretan” lingvon. En ĉiuj vizaĝoj de la gestudentoj oni povis vidi kiel ili miris ... Jes sed post lia studado de medicino, Zamenhof verkis pli bonan lingvon denove, tio estis la unua perfektigo de Esperanto. Kaj apud Esperanto estis pluraj planitaj lingvoprojektoj de aliaj homoj, sed nur Esperanto estas nun vivanta kaj uzata lingvo.

Post tio mi diris ke mi vere ŝatas la anglan, kaj multaj homoj detruas kaj fuŝas la anglan kiam ili provas uzi ĝin. Kiel domaĝe por tia bela lingvo. Ĝi estas bela sed tro komplika. Mi lernis dum 9 jaroj da angla tiom kiom mi lernis dum lernado de unu jaro de Esperanto. Ankaŭ konatulo en Pittsburgho diris al mi ke ĉiuj eksterlandanoj ja parolas la anglan kaj mi rimarkis kaj respondis al li: Jes, ĉu vi irus al iu lando kies lingvon vi ne konas kiam via hejmlando permesas altan vivonivelon? Jes, kompreneble nur la Germanoj kiuj scipovas la anglan venas aŭ estas senditaj, kiel mia edzo por 3 jaroj, al Usono. La aliaj restas hejme, ĉu ne? Aŭ kiom da homoj el Meksiko aŭ suda Ameriko bone regas la anglan kiam ili venas al Usono pro manko de simile bonaj vivkondiĉoj en sia lando??

Ĉiukaze ni rigardis travid-

eblajojn kiujn mia kara edzo faris por mi hieraŭ vespere el la libro *The ABCs of Esperanto* en kiu videblis ke 20% da homoj en la mondo parolas la ĉinan (mandarinan — en la ĉina ankaŭ ekzistas miloj da lingvoj) kaj nur 10% parolas la anglan. Kaj cetere mi ĵus legis leteron de ĉino en la reto, mi rakontis, kaj miris kiel bone li regas Esperanton, precipe ĉar mi jam aŭdis fuŝegan anglan de ĉinoj.

Parolante pri la facileco de Esperanto mi donis ekzemplojn pri la vorto-kunmetado kaj la solaj 16 regulojn de E-o. Adjektivoj finiĝas je *-a* kaj substantivoj je *-o* kaj ke oni ĉiam povas ŝanĝi ilin al la verbo kaj la apartenanta verbo: *familio, familia, familii* — oops, kion signifas *familii*?

Mi donis aliajn ekzemplojn de vortokunmetado kiel *faks-ilo* kaj mi antaŭe prelegis ankaŭ pri la regulo *unu litero-unu sono* kaj la akcento sur la antaŭlasta silabo, do tiam jam finiĝis la klaso kaj mi poste donis al la instruistino Sinjorino Miller la vortoliston kiun mi pretigis kaj flugfolion faritan de mi kun la teksto de Dirk Ederveen pri *Pasporta Servo*. Do se oni iam ajn volas veturi al Parizo kaj scipovas Esperanton oni povas tranokti ĉe esperantistoj. Mi rakontis al ŝi ke kvankam mi estas favora al la lernado de Esperanto por ĉiuj, kelkaj esperantistoj volas resti familio, kaj ne vere volas ke ĉiuj parolu ĝin, ĉar oni tion perdos tiam.

Ŝi diris ke ŝi faros kopion, almenaŭ de la vortolisto kaj transdonos ĝin al la lernantoj. Mi mem miris ke estis tiom da lernantoj en unu klaso, mi opinias ke ili estis almenaŭ tridek ĝis tridekok lernantoj. Ŝi dankis denove ke mi venis kaj mi proponis veni iam denove por alia klaso. Jes, ŝi diris, sed la venonta klaso estos en Septembro ... Mi diris ke mi ankoraŭ estos en Pittsburgh tiam kaj mi nun jam bone konas la vojon.

Deziras Korespondi

BELGIO

*29-jara fraŭlo, komencanto, esploranto en la universitato de Bruselo, interesas literaturo, poezio, filozofio (ĉefe klasika), vojaĝado, tre amas Hispanion kaj ŝatas vojaĝi tien. Sergey SMIRNOV, Linthout strato 17, BRUSSELS, <cep2eu@yahoo.com>

BRAZILIO

*34-jara komencanto, vendisto, interesas literaturo, ekologio, homaj rajtoj, memkonado, prefere paperpoŝte. Luis Paulo Martins NOGUEIRA, R. Miguel Odia Fagundes 86 case 01, Bairro Fazendinha, CURITIBA - PR - CURITIBA, CEP 81320-150

BURUNDIO

*Proks. 130 lernantoj de Esperanto diversaĝaj, en Centre d'Education et Formation Intégrée (CEFI), en urbo Uvira, Kongo, apud la landlimo de Burundio, serĉas korespondantojn kaj helpantojn pri lernomaterialoj. Namutema Wabasobe ATHANASE (instruisto), B.P. 3484, BUJUMBURA, <cefi.org@caramail.com>

ĈILIO

*14-jara knabo, interesas lingvoj, muziko, tabloteniso, naĝado. Carlos REYES, Santa Sofia Strato 321, Altomacul, SANTIAGO, <carlosrb@terra.cl>

ĈINIO

*Prezidanto de Xi'an'a Esperanto-Asocio kaj komercisto internacia, serĉas korespondantojn kiuj volas komerci per Esperanto. WANG Tianyi, Jiang-Gong-Lu 8, CN-710043 XI'AN, <esp@pub.xaonline.com>

FRANCIO

*10-11-jaraj francaj gelernantoj, pri aliaj vivmanieroj kaj kulturoj, kun samaĝuloj. Rachel PRUAL (instruistino), École Montjoie (groupe Espéranto), rue Saint André d'Ornay, 85000 LA ROCHE-SUR-YON, <davidcholet@hotmail.com>
*Ege dinamika grupo de komenc-

antoj 12-61-jaraj volas korespondi kun alia grupo, retroŝte aŭ paperpoŝte. David CHOLET, 34 bis, Rue du Vieux Bourg, 85170 DOMPIERRE-YON, <turistoj@hotmail.com>

*23-jara fraŭlo, komencanto, intruas matematikon, interesas scienco, komputiloj kaj linukso, kino, muziko, filozofio, laika humanismo, aliaj vivkondiĉoj, preferas retroŝte. LEBACQ Jean-Sebastien, 10/14 rue de Bolbec, 59700 MARCQ-EN-BAROEUL, <js.lebacq@free.fr>

*44-jara komencanto, edzo, oficisto, interesas jago, ŝako, literaturo. LALY Philippe, 34 Rue des Jacobins, 95240 CORMEILLES en PARISIS, <phialy@free.fr>

GERMANIO

*40-jara fraŭlo, studas filozofion, matematikon, teologion, interesas muziko, literaturo, filozofio, historio, politiko, ekologio, serĉas precipe italajn kaj hispanajn gekorespondantojn dezirantajn lerni la germanan lingvon. Klaus MOHRHOFF, MINDENO, <klmohrhoff@aol.com>

*Serĉas kontaktpersonojn en ĝemelurboj de Erlangen: en Usono temas pri Richmond (ŝtato ne indikita). Bernhard MAURER, ERLANGEN, <maurer.erlangen@t-online.de>

HISPANIO

*17-jara fraŭlo, komencanto, interesas homaj rajtoj, pacismo, sennaciismo, punk-muziko, filozofio, kun pacamantoj kaj homoj volantaj plibonigi nian mondon. Iker CARRASCO MENDEZ, Otalora 38 1A, 20550 ARETXABALETA, Gipuzkoa, <ikr_eusk@hotmail.com>

*38-jara fraŭlo, plurjara esperantisto, verkisto, interesas literaturo. Andoni HIERRO, Plaza Xaho 1-5A, 48940 LEIOA (Vizcaya), <tepgaitj@lg.ehu.es>

*Interesas vojaĝoj kaj aliaj. Manel VINHALS Allepuz, C/. Maestrat 18, E43560 LA SÈNIA, <mvinyals@lasenia.net>

HUNGARIO

*16-20-jara grupo de lernantoj en komerca mezlernejo, volas kores-

pondi dise en la mondo. Julia TIMÁR (instruisto), Kisköre utca 10.3/13/H-1116, BUDAPEST, <timar_j@freemail.hu>

*26-jara fraŭlo, studas historion kaj informadikon, interesas kulturo, artoj, lingvoj, muziko, filmoj, kolektas bk. Peter MOLNAR, BUDAPEST, <petmol@freemail.hu>

*30-jara opiniesploristo kaj studento, interesas sociologio, TTT, Esperanto, radiotelefonoj, homoj, vojaĝado, preferas retroŝte. Imre TULOK, Kölcsey ltp. 20, H-7100 SZEKSZARD, <tulokimre@primposta.com>

ITALIO

*11-14jaraj infanoj (30), perletere. Insegnante Angelo SCALIA, Scuola Media Statale "Francesco Petrarca", Via Amulio 4, IT-00181 ROMA.

*26-jara fraŭlo, samseksema, kristano, komencanto, interesas religioj, astrologio, lingvoj, sciencoj, kun samseksemaj viroj. Michel Medina Sidonia del CASARRO, PALERMO, <boscogrand5@virgilio.it>

*33-jara fraŭlo, komencanto, interesas muziko, vojaĝoj, internaciaj aferoj, lingvoj. Stefano PRIANTE, v. Maurisio 35, 36100 VICENZA, <ffefo@libero.it>

KANADO

*31-jara fraŭlo, komencanto, kun du infanoj, teknika desegnisto, interesas lingvoj, muziko, scienco, mitologio, kuirado, preferas korespondi retroŝte sed ankaŭ povas paperpoŝte. Victor TILLEY, 235 Hamilton Ave., ST. JOHN'S NL A1E 1J6, <exxcitte@hotmail.com>

KROATIO

*Interesas skulpturo, kulturo ĝenerale. Nikola MATIJEVIC, ZAGREB, <nikola.matijevic1@zg.hinet.hr>

NEDERLANDO

*26-jara viro, interesas dombestoj, legi, naturo, reto kaj vojaĝi, sporto estas "korfbal" (korbopilko en kiu ludas teamojn de 4 viroj kaj 4 virinoj). Tjerry STEENHUISEN, Sternmesschen 10, 9403 ZZ ASSEN, <ratmaniak@hotmail.com>

NEPALO

*Interesas instruado, fotoj, journaloj, revuoj, lingvoj, bildkartoj, bildoj, komputiloj, legado, vojaĝoj, preferas paperpoŝton. Navin Lal SHRESTHA, GPO Box 11753, KATHMANDU, <skribu_navin@yahoo.com>

POLLANDO

*36-jara fraŭlino kun filo, interesas muziko, filmo, trikado, volus ekkoni vivmanierojn kaj interesojn de homoj en aliaj landoj. Barbara KRUSZEWSKA, ul. Wojska Polskiego 62A/9, PL 19-300 ELK, <basiak67@op.pl>

*40-jara viro, mezkapabla en Esperanto, interesas lingvoj, vojaĝado kaj naturo. Marek BAMBERSKI, Huta Stara 120, PL-42-350 KOZIEGLOWY, <marko.polo@linuxmail.org>

*50-jara edzo, energetika inĝeniero, meza scipovo de Esperanto, interesas vojaĝado, homa interkomunikado, politiko, trezorserĉado, kolektas pm, prefere kun korespondantoj en Eŭropo kiujn li povos renkonti dum vojaĝoj. Andrzej DOMANSKI, Belzacka 80/88 m 53 bl 17, PL 97-300 PIOTRKOW TRYB, <anddoma@poczta.onet.pl>

*Sendependa kurac- kaj kosmetikmasaĝisto, serĉas homojn kun simila intereso por interŝanĝi ideojn. Andrzej LADZINSKI, <biosano@o2.pl>

RUMANIO

*Bianca MURESAN, Fagetul Ierii 38, 3359 Iara, CLUJ, <biancamuresan@yahoo.com>

RUSIO

*17-jara studentino de ĵurnalistiko en Humanitara universitato, interesas muziko, lingvoj, komputiloj. Ksenia LISCOVA, Ul. Starostina 13/1-67, 183072 MURMANSK

*17-jara komencantino, interesas muziko, naturo, aerobiko. Milena VORONANINA, Ul. Maklakova 35-28, 183072 MURMANSK

*19-jara fraŭlo, komencanto, kuiristo, sukeraĵisto, interesas aliaj lingvoj, kuirartoj, kaktokulturado, monerkolektado, skiadon kaj piediradon. Pri diversaj kulturoj kaj ĉiutaga vivo. Alex

DERJUGIN, SARATOV, <deryugin@bk.ru>

*46-jara edukistino en infanĝardeno, meznivela esperantisto, interesas lingvoj, legado, geografio, vojaĝoj, ĉefe kun Norvegio, Finnlando kaj Svedio, prefere paperpoŝte. Elena PEREDRUK, Do Vostrebovanija / poŝte restante / Glavpoĉtamt, 183000 MURMANSK, <masiukas@mail.ru> (bv meti "Por Elena Peredruk" en la tem-linio)

*Pensiulino iom pli ol 50-jara, eksinĝeniero pri havena konstruado, meznivela Esperanto, interesas muziko, dancoj, naturo, vojaĝoj, turismo. Ljudmila CIBULSKAJA, ul. Oktjabrskaja 30-49, 183038 MURMANSK.

*54-jara pensiulino, interesas lingvoj, naturo, religio, literaturo, poezio, preferus korespondantojn de Germanio, Norvegio, Svedio kaj Finnlando, ankaŭ volus aŭdi salutojn el ĝemela urbo Jacksonville, Kalifornio (? Eble Florido?). Nelli TRUBKINA, Ul. Krupskoj 66-27, 183053 MURMANSK

UKRAINIO

*25-jara fraŭlo, inĝeniero en telefona entrepreno de elektrokomunikado, interesas lia laboro, kun samfakuloj por interŝanĝi spertojn, nur retpoŝte. Sergej SERDJUK, strato Dorojnaja 63, vilaĝo SERDITOJE, distrikto Ŝahtjorsk'a, regiono Doneck'a, 86250, <sergejserdjuk@mail.ru>

USONO

*18-jara fraŭlino, komencanto, ĝojas desegni kaj legi, studas arton. Emily NEWMAN, BOSTON MA, <funkyraincoat@hotmail.com>

*23-jara komencanto, studas la Biblion en Biblio-universitato, interesas muziko, lingvoj, lernado pri diversaj kulturoj. Arono CROSSLEY, PO Box ABC, BRADLEY WV 25818, <Gnisi@aol.com>

*24-jara fraŭlo, rabeniĝonto, meznivela Esperanto, interesas aviado, vojaĝado, lerni lingvoj, koni fremdajn kulturojn. Stefano EDIO, 1555 East 16th St., BROOKLYN NY 11230, <stefano_edio@hotmail.com>

*29-jara fraŭlo, bone parolas

Esperanton, volas koni homojn kaj lerni pri aliaj landoj. Craig Lee CHRISTO, PETALUMA CA, <Walabio@MacOSX.com>

ZAMBIO

*19-jara studanto, rifuĝinto el Burundio. Mike LINE, LUSAKA, <aline_brt@yahoo.fr>

ZIMBABVO

*24-jara fraŭlo, komencanto, interesas homa interkomunikado, lernado de lingvoj, legado kaj muziko. Germain Mukandama MAURIDI, PO Box W 78 waterfalls, HARARE, <germainwamauridi@junglemate.com>

En Bostono

David Wolff (raportis 2003.04.28)

The EarthFest at the Hatch Shell went reasonably well. I discovered the magic words, "I'm an exhibitor," which made the police let me park on Storrow Drive. The cold and rain apparently kept some 75,000 people away, but those who did come and who found the tent with our table were interested in hearing about Esperanto. We mostly stayed dry despite puddles around several other tables. In addition to the handouts I already had available, I had copied two full boxes of flyers and Beer Posters; both boxes came home unopened.

Thanks to all who showed up to help: Perry Barnett, Frank White, Christopher, and Bill Harris. Jacob Schwartz and his gang appeared (Brand, Hakon, Sonia and others; I've forgotten most of the names and probably mangled these) — it was the first time I've ever had multiple Esperantists appear at a table!

Ĉu Vojaĝi?

Mi jam respondis al la dua demando multfoje en ĉi tiu rubriko de *Esperanto USA*. Certe! Ni vojaĝu Esperante. Estas la plej sekura kaj plengua metodo.

La respondo al la unua demando dependas de via libera tempo, libera mono, kaj specialaj interesoĵ. Sed konsideru la sekvajn aranĝojn:

NOREK - Nord Okcidenta Regiona Esperanto Konferenco

5-7 Sept., Sidney B.C. Canada. Detaloj haveblaj ĉe Kanada Esperanto Asocio, (250) 656-1767 aux ĉe lwolemskatl@aol.com

OKEMO - 10a Internacia Semajnfino Esperantista,

11-13 oktobro, Okemo Mountain Resort, Ludlow, Vermont. Detaloj: <http://www3.simpatico.ca/esperanto/eo-okemo.htm>.

Tri-Kalifornia Konferenco (AIS-ASM) 31oct - 2 nov, Mexicali, Mexico. Kursaro de Esperanto, meznivela kaj supera. Details from iasmexico@mxl.cablemas.com.

KIO PRI KUBO?

La 6a Tut-Amerika Kongreso okazos ĉiun trian jaron - do en 2004, la kongreso okazos en Kubo. Ĉu Usonanoj rajtas iri? Estas multe da konfuzo pri niaj rajtoj iri al Kubo. La fakto estas ke ni rajtas iri ien ajn ni deziras iri (se ni ne militas tie), sed la politiko dum multaj jaroj pri Kubo estis/as/os(?) ke ni ne rajtas "komerci kun la malamikoj." Laŭ tiu frazo, se ni pagos por servoj, manĝaĵoj, hoteloj, ktp ni komercos kun la malamikoj. Ekzistas kelkaj esceptoj: profesiaj (plentempaj) jurnalistoj; oficialaj reprezentantoj de la Usona registaro; membroj de internaciaj organizoj vojaĝante oficiale; vizito al parencoj; kaj tiuj kiuj posedas specifajn licencojn. Sub tiuj kondiĉoj neniu el ni - krom Kubanoj kiuj havas parencojn tie - rajtas iri.

Many of the specific licenses which have been granted in the past are scheduled to be dropped before the end of 2003. You may have heard of people who have traveled to Cuba with some group or even privately in the past, but those previous specific licenses will no longer exist. I myself have traveled to Cuba twice - the first time was when the travel ban was lifted during the presidency of Jimmy Carter. The second time I went was to take part in the Universala Kongreso de Esperanto in 1990. At that time we were unable to get

Ĉu vojaĝi Esperante?

official permission - so those of us who went were "hosted" by other groups - such as Monda Turismo - so that we did not spend any "American" money there. As a travel agent, I arranged several teachers' groups "to study the educational system" there. It was a surprise to these teachers that there was absolutely no problem paying in dollars and getting change in dollars. Most of those dollars came from people who traveled to Cuba via Mexico or Canada unofficially. In spite of the fact that this was/is strictly against the law, we know of no ordinary tourists who have been prosecuted; but we do know of travel agencies who have suffered financially for arranging "unofficial" and therefore "illegal" visits there.

We are hoping to be able to arrange a "general" license (under the to-be-developed new rules) to attend the Tut-Amerika Konferenco. Esperanto Vojaĝ-Servo hopes to get such a ruling for its members to go officially next year, but we will not know before November or later. We are working with the largest official travel agency to get such a "general" license. If you are interested, we will need to have a group (probably a minimum of 10-15,) and it will not be cheap. The arrangements in Cuba are inexpensive, but getting there is not. The convention is scheduled for Havana, Cuba 21-27 March 2004. Sub la temo "Kia Esperanto-Movado por Ameriko?" la kongresanoj ĝuos tutan semajnon de varia programo kun prelegoj, kunsidoj pri la amerika agado, rondaj tabloj, kulturaj vesperoj, ekskursoj kaj aliaj interesaj programeroj. La Loka Preparkomitato de la 6a TAKE invitas vin veni al Kubo kaj esperantumi en nia kariba insulo, kie Esperanto estas solida kaj matura kaj kompreneble oni organizos antaŭ- kaj postkongresojn por ebligi al ĉiuj partoprenantoj pli longan restadon en nia lando kun la ĉiama gastamo de la Kuba esperantistaro.

La 89a Universala Kongreso de Esperanto - Pekino, Ĉinio 24-31 julio 2004. The SARS quarantine on Peking has been lifted so these should be no problem attending the UK if you so desire.

ESPERANTO VOJAĜ-SERVO

6104 LaSalle Ave., Oakland CA 94611
[510] 339-2001 • LusiHarmon@aol.com

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040